

N. N. 32,

Jen ĉiamviva Rozo

tradukita de Leland Bryant Ross

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profet'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun impet'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vintra
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
la menciita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Ŝi naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-arom'
Heligas per Digloro
la vojon de la hom'.
Ja homo, tamen Di',
ĝi ŝarĝojn malpezigas
Kaj homojn savas ĝi.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros' Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.